

17.

Kondukanto internacia

de l'

Interparolado

kun modeloj de leteroj.

Ellaboris

A. Grabowski.

(Tiu-ĉi verko estas trarigardita de D^{ro}. Esperanto.)

Internationaler Führer

der

—••••• Konversation •••••

mit Briefmustern.

Ausgearbeitet

von

A. Grabowski.




NÜRNBERG

Heerdeggen-~~B~~arbeck

1890.

15A



Vorwort.

Antaŭparolo.

Um einen Wunsch vieler Freunde unserer Sache zu erfüllen, habe ich den vorliegenden internationalen Führer ausgearbeitet; ich gebe denselben heraus, ohne ihn in irgend eine nationale Sprache zu übertragen; denn diese Form ist aus mannigfachen Gründen nach meiner Ansicht die praktischste. Wer sich das kleine Fundamental-Wörterbuch angeeignet hat, vermag ohne irgend eine Schwierigkeit den Führer zu verstehen, wie man auch die übrigen internationalen Schriftchen verstanden hat. Wenn man nun die Gespräche ohne Uebertragung in seiner Muttersprache liest, wird man sich zu gleicher Zeit auch gewöhnen, international zu denken, was ein grosses Hilfsmittel für das flüssige Sprechenlernen bildet.

Ich weiss, dass bereits viele Anhänger der internationalen Sprache diesen Führer nicht brauchen; dieselben haben ohne irgendeine Hilfe ganz gut international sprechen gelernt, dennoch hoffe ich, dass auch sie dieses Werkchen sich beilegen werden; denn sie werden in demselben für die Lektüre ein gar nicht langweilendes Material finden. Ich habe nicht die Methode solcher Konversationsbücher nachgeahmt, in welchen die Autoren abwechselnd Sätze, Fragen und Antworten ohne irgend einen inneren Zusammenhang geben, sondern Dialoge, voll von Geist und gutem Humor gesammelt, wo immer ich die schönsten und passendsten für mein Werkchen finden konnte, ohne dass ich bemüht war, meine Arbeit originell zu gestalten. Nachdem ich die bekanntesten Sätze gegeben und gezeigt habe, wie man internationale Visiten macht, wie man international schläft, spazieren geht, isst, trinkt, reist, liebt

Plenumante la deziron de multaj amikoj de nia afero mi ellaboris la nunan »Kondukanton internacian«; mi eldonas ĝin sen traduko en ia lingvo nacia, ĉar el multaj kaŭzoj tiu-ĉi formo laŭ mia opinio estas la plej praktika. Kiu ellernis la malgrandan fundamentan vortareton povas sen ia malfacilo kompreni la »Kondukanton« tiel same kiel oni komprenis la ceterajn libretojn internaciajn, kaj legante la interparolojn k. c. sen traduko en sia lingvo patra, oni kutimiĝos unutempe ankaŭ pensi internacie, kio estos granda helpo, por pli rapida lernado paroli.

Mi scias ke multaj adeptoj de la lingvo internacia jam ne bezonas kondukadon, ili ellernis tute bone kaj lerte paroli internacie sen ia helpo, tamen mi esperas ke ankaŭ ili alprenos la nunan verketon, ĉar ili trovos en ĝi tute ne enuigan materialon por la legado. Mi ne postiris la metodon de tiaj lernolibroj de parolado, kie la aŭtoroj donas miksite frazojn, demandojn kaj respondojn sen ia interna kuneligo, sed mi kolektis dialogojn plenajn je sprito kaj bona humoro, kie ajn mi nur trovis la plej belajn kaj konvenajn por mia libreto, tute ne penante je originaleco de la laboro.

Doninte frazojn la plej ofte uzatajn, montrinte kiel oni faras vizitojn internaciajn, kiel oni dormas, promenas, manĝas, trinkas, vojiras, amas internacie kaj edziĝas, mi fine eĉ kondukas la legantojn en la Ĉielon kaj Inferon (de

und heiratet, führe ich die Leser schliesslich sogar in den Himmel und in die Hölle (der alten Griechen, welche ich ebenfalls veranlasse in unserer Sprache zu reden).

In dem 2. Teil des Werkchens findet man einige Musterbriefe und zum ersten Male Geschäftsbriefe, Wechsel etc. in unserer Sprache, welche, wie man sieht, sich für alle Zwecke geeignet zeigt.

Das ganze Werk ist nicht gross und kann auf Vollständigkeit keinen Anspruch machen; aber man vergesse nicht, dass jeder Anfang schwer ist und ich nur den ersten Schritt in dieser Richtung machen wollte. Die Zeit wird uns sicherlich bald vollständigere Werke bringen nach dem grossen, ja sogar ungehofften Fortschritt zu schliessen, den unsere Sprache während des 1. Jahres ihrer Existenz zu verzeichnen hat. Die Zahl der Anhänger in allen Ländern ist bereits ziemlich gross und wächst unaufhörlich, so dass wir schon ganz beruhigt sein können über den schliesslichen Sieg unserer schönen und nützlichen Sache; dennoch dürfen wir unsere Energie nicht erlahmen lassen und nicht vergessen das letzte Wort des Autors: Lasst uns arbeiten und hoffen!

la malnovaj Grekoj, kiujn mi ankaŭ igas paroli nian lingvon).

En la dua parto de la libreto oni trovas kelkajn modelojn de leteroj, kaj por la unua fojo leterojn komercajn, leterojn de ŝanĝo (kambiojn) ke. en nia lingvo, kiu, kiel oni vidas, estas oportuna por ĉiuj celoj.

La tuta laboro ne estas granda, kaj ne povas pretendi je pleneco, sed ni ne forgesu, ke ĉiu komenco estas malfacila, kaj mi nur volis fari la unuan paŝon en tiu-ĉi branĉo. La tempo certe al ni baldaŭ alportos pli plenajn laborojn, se ni devas juĝi laŭ la mirinde granda eĉ ne esperita progreso kiun faris la Lingvo internacia en unu jaro de ekzistado. La nombro da adeptoj en ĉiuj landoj de la civilizita mondo estas jam sufiĉe granda, ĝi kreskas senhalte, kaj ni jam nun povas esti tute trankvilaj pri la fina venko de nia bela kaj utilega afero; tamen ni ne devas malfortigi nian energion nek forgesi la lastan vorton de l' Aŭtoro: Ni laboru kaj esperu!

La Kondukanto.

Parto unua. Interparolado.

I.

Frazoj la plej ofte uzataj.

Por demandi, respondi.

Kiu estas tie? — Kiu vi estas? — Kun kiu mi havas la honoron paroli? — Kiel vi estas nomata? — Mi estas nomata N. — Kion vi volas? — Kion vi deziras? — Mi bezonas paroli kun vi. — Mi havas ion por diri al vi. — Ĉu vi min konas? — Mi ne havas la honoron vin koni. — Aŭskultu min! — Mi vin aŭskultas. — Ĉu vi min komprenas? — Mi vin ne komprenas. — Kial vi ne respondas? — Mi aŭdis malbone. — Kion vi volas diri? — Kion vi diras? — Kio estas? — Al kio ĝi servas? — Ĉu vi parolas internacie? — Mi komprenas pli bone, ol mi parolas.

Por proponi.

Ĉu vi ion bezonas? — Kion vi bezonas? — Kion vi deziras? — Ĉu estus agrable al vi? — Per kio mi povas servi al vi? — Per kio mi povas esti utila al vi? — Kion vi postulas? — Kion vi petas? — Kion mi povas proponi al vi? — Kion vi elektas? — Alprenu ĝin, por fari al mi plezuron! — Mi ĝin proponas al vi el bona koro.

Por peti.

Mi havas peton al vi. — Ĉu vi volas fari servon al mi? — Ĉu mi povas vin peti je ĝentileco? — Ĉu vi povas konsenti al mia peto? — Faru al mi la plezuron! — Ĉu vi estus tiel bona? — Ĉu vi volas fari al mi la ĝentilecon? — Mi vin petas je tio. — Pardonu min, mi petas! — Ĉu mi povas kalkuli sur vin? — Mi multe bedaŭras ke mi vin maltrankviligas. — Ne malkonsentu, mi petas. — Vi min ŝuldigos senfine. — Ĉu vi havas la bonecon? — Tio-ĉi farus al mi tre grandan servon. — Mi efektive timas trouzi vian ĝentilecon.

Por konsenti.

Jes, certe. — Mi estas tute preta servi al vi. — Mi konsentas al tio. — Kun plezuro. — Mi faros la eblon. — Vi povas esti certa, ke mi faros ĉion, kio dependas de mi. — Mi neniam povas malkonsenti al vi. — Kalkulu sur min! — KREDU al mi tute! — Mi prenas sur min vian aferon. — Super ĉio, kion mi havas, vi povas ordoni. — Se vi min bezonas, sciigu min. — Mi atendas viajn ordonojn.

Por malkonsenti, praviĝi.

Ne, ne estas eble. — Mi ne povas konsenti je tio. — Tio-ĉi min ne tuŝas. — Mi multe bedaŭras, ke mi devas malkonsenti. — Senkulpigu min, mi petas, mi faris la eblon. — Tio-ĉi ne dependas de mi. — Ne koleru je tio. — KREDU, ke ne estas mia kulpo. — Mi petas milfoje pardonon, mi bedaŭras tion kiel vi. — Ĝi restos por alia fojo.

Por fari kaj ricevi dankojn.

Mi dankas. — Mi dankas al vi. — Alprenu de mi mil dankojn. — Mi estas via ŝuldanto. — Mi konservos al vi eternan dankemon. — Ĝi ne estas inda je parolado. — Mi estas al vi multe danka por tio. — Ĝi estas nenio. — Mi redonas dankojn al vi. — Mi neniam forgesos, kion vi faris por mi. — Mi volus fari pli multe. — Vi faris al mi servon, kiun oni ne forgesas. — Vi estas efektive tro bona. — Vi faras por mi multon da penoj. — Alprenu la esprimon de mia profunda dankemo. — Mi ne scias kiel danki por la granda servo. — Mi multe bedaŭras la laboron kiun mi kaŭzis al vi. — Ni esperu, ke iam mi povos plenumi mian devon kontraŭ vi. — Mi estas tre kontenta ke mi povis esti utila al vi. — Mi esperas rezervi al vi.

Por konsili, pripensi, decidi.

Kion vi farus estante en mia loko? — En via loko mi farus la jenon . . . Kion mi devas fari? — Laŭ mi, jen kion vi faros . . . Kion vi konsilas al mi fari? — Mi ne scias bone, estas afero grava. — Kion mi faros? — Pri kio vi pensas? — Mi kredas ke vi estas prava. — Kia estas via opinio? — Mi tute dividas vian opinion. — Ĉu vi ne estus farinta la samon? — Mi vidas ke mi

faris malbone. — Je kio sin teni? — Metu vin en mian situacion. — Atendu, venas al mi ideo. — Kion vi diras pri tio? — Efektive, via ideo estas tre bona. — Kiel ŝajnas al vi? — Mi estas decidita. — Ĝi estas via opinio? — Mi kredas, ke vi faros bone. — Ĉu ne estas alia konsilo? — Mi devis postiri mian unuan ideon. — Kion ni faros? — Oni devas tamen preni decidon. — Mi faros alie.

Por certigi.

Nenio pli vera. — Mi donos al vi vidigojn. — Mi ĵuras al vi, ke ĝi estas la vero. — Mi donas al vi mian vorton de honoro. — Mi diras al vi, ke ĝi estas vera. — Ĝi esta certa. — Estu certigita! — Vi povas kredi al mi. — Mi estas certa je tio. — Mi garantias al vi la fakton. — Mi povas vin certigi je tio. — Mi havas klarajn vidigojn.

Por nei.

Vi vin trompas. — Tio-ĉi ne estas vera. — Ne, ne vera. — Estas malvero. — Ne povas esti. — Mi vin certigas, ke ne. — Mi ne diris tion-ĉi. — Mi neas formale. — Mi penas kredi al vi. — Vi estas en la plej granda eraro. — Vi vin trovas en eraro. — Nenio pli malvera ol tio.

II.

Interparoloj.

Vizito.

A. Oni sonoras. Oni frapas. Ĉu estus sinjoro B.?

Servanto. Sinjorino, ĉu vi volas akcepti sinjoron B.?

A. Enkonduku lin en la saloneton.

B. Sinjorino, mi havas la honoron deziri al vi bonan tagon.

A. Bonan tagon, sinjoro.

— Sidiĝu, mi petas.

— Volu sidiĝi.

— Kiel vi fartas?

B. Tre bone, sinjorino, mi dankas. Kaj vi?

A. Mi estis iom malvarmuminta, sed hodiaŭ mi fartas tre bone.

B. Mi ĝojas, vin ree vidi en sano.

A. Vi estas tre ĝentila ke vi pensas pri ni.

— Estas jam longe, ke mi ne havis la plezuron vin vidi.

B. Mi prezentis min kelkajn fojojn ĉe vi, sed ne havis la feliĉon vin trovi en la domo.

— Oni transdonis al vi mian karton de vizito.

A. Efektive, kaj mi multe bedaŭras, ke mi ne estis en la domo por vin akcepti.

B. Kiel fartas sinjoro via patro?

A. De kelkaj tagoj li estas iom suferanta, li ne devas eliri el la ĉambro.

B. Mi malĝojas je tio.

— Mi esperas ke estos nenio danĝera.

A. Nenio danĝera, sed en lia aĝo li devas esti singardema.

B. Sinjoro via frato fartas ĉiam bone?

A. Ho! li havas sanon de fero. Mi devas ĉiam ripetadi al li, ke li estu singardema.

B. La indon de la sano oni konas, kiam oni ĝin perdis. — Kaj sinjorino via fratino, kiel ŝi fartas?

A. Ŝi neniam estas sana du tagojn unu post alia, kaj tial ŝi uzas la tutan eblan singardemon.

B. Kiuj zorgas la plej multe por konservi la sanon, tiuj ĝin perdas la plej facile.

A. Vi estas eble prava; sed en ĉiu afero estas malfacile konservi la ĝustan mezon.

B. Kaj tial la sano estas trezoro la plej multekosta kaj la plej malbone gardata.

A. Al kiu vi ĝin diras? Mi ne povas plendi je mia sano, kaj tamen ofte mi sentas min nebone.

B. Neniu dirus tion-ĉi, ĉar vi elrigardas ĉiam tiel bone.

A. Vi faras al mi komplimentojn.

B. Oni faras komplimentojn al la personoj, kiuj nin ne tuŝas, sed al la personoj kiuj estas karaj al ni . . .

Servanto. Sinjoro kaj Sinjorino N.

A. (Al si) Kia malĝusta tempo! (laŭte) Petu ilin eniri en la salonon.

B. Permesu, ke mi min foringu, sinjorino.

A. Vi volas min forlasi tiel rapide?

B. KREDU, ke mi multe bedaŭras, sed mi ne povas resti pli longe en via societo.

- A. Mi egale bedaŭras, ke via vizito estis tiel mallonga.
B. Se vi permesas, mi min rekompencos por tio alian fojon.
A. Vi faros grandan plezuron al mia patro; li amas multe vian societon.
B. Se mi ne timus esti maloportuna al li.
A. Mia patro estos tre kontenta vin vidi.
B. Havu la bonecon rememorigi min al li.
A. Mi certe ĝin faros.
B. Al plezura revido.
— Mi rekomendas min al via memoro.
A. Via servantino. (Sola). La gesinjoroj N. povus elekti alian momenton.
— . . . Kiom da vizitoj enuigaj oni devas elportadi ĉiutage.

La vetero.

- A. Kia vetero?
B. Hodiaŭ estas bela vetero.
— Fariĝas bela vetero, ni havos belegan tagon.
A. Tiom pli bone, ĉar hieraŭ la vetero estis nekonstanta kaj ŝanĝa.
B. Mi ĝin bone sentis: ĉar kaptis min pluvego neesperita kaj mi estis banita ĝis la ostoj.
A. Tial vi havis nek ombrelon nek palton?
B. La ĉielo estis tiel bela, ke elirante mi nenion kunprenis.
A. Jes, sed la aero estis peza, la varmego premanta, kaj sur la ĉielo montris sin la nubetej kuprokoloraj, la antaŭuloj de l' uragano.
B. Mi kredis, ke ili disiros.
A. Vi faris la kalkulon sen la mastro.
B. Jes, efektive, ĉar subite sin levis vento, la ĉielo sin kovris per nubegoj, kaj pluvo batanta miksitita kun hajlo komencis fluegi sur min.
A. Bedaŭrinda amiko! kaj kie vi estis en tiu-ĉi momento?
B. Duonon de mejlo de la urbo en kampo malkovrita.
A. Ĉu vi ne povis kaŝi vin ie?
B. Nenie. Estis kelkaj nuksujoj en la kampo, sed vi scias, kiel estas danĝere kaŝi sin sub arbo dum la uragano.
A. Tial vi ricevis tutan la pluvegen.
B. Nature. Aldonu al tio-ĉi la fulmojn, la tondrojn senĉese batantaj, kaj la venton kiu forportis al mi la ĉapelon.

- A. La malfeliĉo neniam venas sola.
- B. Mi kuris post ĝi kaj havis la feliĉon haltigi ĝin metante la piedon super ĝin.
- A. Bonega rimedo por doni formon originalan al sia ĉapelo.
- B. Vi ridas, sed mi jam ne ridis. Mi estis prilaborita kiel ŝtelisto: miaj ŝuoj jam sin ne tenis sur la piedoj, la blanka pantalono estis malpurigita ĝis la genuoj, la haroj pendis al mi kiel kandeloj kaj el la ĉapelo gutegis la akvo.
- A. Vi devis bele elrigardi.
- B. Ne estas ankoraŭ ĉio.
- A. Alia malfeliĉo?
- B. Estis necesa iri la domon.
- A. Prave.
- B. Ne estis eble al mi trovi veturilon.
- A. Mi komprenas.
- B. Subite la uragano ĉesas kiel per forto magia.
- A. Ha, fine!
- B. La nuboj disiras, la suno sin remontras, la akvoj forfluas aŭ elvaporigas.
- A. Jen vi estas savita!
- B. Vi kredas? ne trompu vin! Apenaŭ ĉesis la uragano, kiam amaso da promenantoj elvenis el la urbo kaj komencis disiradi sur la kampoj.
- A. Nenio pli agrabla ol promonado post uragano.
- B. Jes, sed nenio pli malagrabla ol esti vidata de siaj amikoj kaj konatoj en estado en kiu mi min trovis.
- A. Sed mi ripetas, kial vi ne prenis ombrelon?
- B. Ĉar mi ne volas havi la elrigardon de vilaĝa lernejestro.
- A. Vi prenos almenaŭ malpezan palton de somero sur la brakon, se ni eliros nun?
- B. Ne, estas tro neoportune.
- A. En la fino amiko mia, vi estas nekorektebla.
- * * *
- A. Ĉu estas malvarme hodiaŭ?
- B. Ni havas dekkvin gradojn sub la nulo.
- A. Ĉu glaciigis la rivero?
- B. Ĝi estas kovrita de glitistoj.
- A. Estas nebulo?
- B. Ne, la frostoj estas forta, sed klara la ĉielo.

- A. Tiom pli bone.
B. Se vi devas eliri el la domo, prenu varman superveston, la frosto estas tre forta.
A. Ĉu estas glita vetero?
B. Ne, ne estas glitige.
A. Ĉu falis multe da neĝo?
B. Neĝadis tutan la nokton.
A. Tial la aero devis fariĝi malpli akra.
B. Efektive, hieraŭ vespere la termometro montradis dudek gradojn.
A. Dudek gradojn! Ĉu estas eble! Vere, mi kredas ke nia tera globo malvarmiĝas.
B. Kion vi volas? Ĝi fariĝas maljuna.
A. En ĉiu okazo, mi plivolos sekan malvarmon ol aeron malsekan kaj malsanan.
B. Vi pensas kiel mi, sed oni devas alpreni la veteron fluidigan kiam ĝi venas.
A. Ne parolu al mi pri tio; mi malamas la fluidiĝadon de glacio, la neĝon akviĝantan, la pluvon, la nebulon kaj la tutan reston.
B. Vi volus ĝui eternan printempon?
A. Mi alkutimus bonege.
B. Tial forlasu tiun-ĉi teron kaj iru loĝadi sur la Kampoj Elizeaj.
A. Mi dankas por via bona konsilo, mi uzos ĝin en sia tempo.

La leviĝado el la lito.

- A. Kiu frapas?
— Kiu estas?
B. Estas mi. Malfermu!
A. Eniru! La ŝlosilo estas en la seruro.
B. Kiel eble! Vi estas ankoraŭ en la lito.
A. Kioma horo?
B. Estas la horo de leviĝo.
— Estas la oka.
— Apenaŭ sonoris la oka.
— La oka elbatis.
— Estos la oka post momento.
— Estas kvarono de la naŭa.
— Estas la duono de la naŭa.
— Sur mia horloĝeto estas dudek minutoj de la naŭa.
— Estas tri kvaronoj de la oka.

- A. Mi ne sciis kioma horo estas.
- B. Leviĝu. La tempon perditan oni jam ne rericivas. (Post paŭzo.)
Vi ne respondas? (A. ronkas.) O! la maldiligenta, la dormulo, li ree ekdormis. (Laŭte.) He, amiko mia, vekigu!
- A. La dormo matena estas tiel dolĉa! Mi amas dormi longe je l' mateno.
- B. Mi ne komprenas, kiel vi povas restadi tiel longe en la lito.
- A. Kiam oni dependas de neniu, oni povas dormi trankvile.
- B. La grandaj homoj dormas malmulte.
- A. Ho! mi ne estas ambicia.
- B. En ĉiuj landoj la personoj laboremaj sin levas matene tre frue.
- A. Mi vivas de rentoj; mia mono laboras por mi.
- B. Oni devas profiti de ĉiu horo.
- A. Kiam mi estas leviĝinta, mi ne scias kiel pasigi la tempon; mi enuas.
- B. La enuo venis en la mondon kune kun la maldiligento. Faru kiel mi faras, kaj vi ne enuos.
- A. Kiel vi faras?
- B. Mi dividas mian tempon inter la plezuroj de mia aĝo kaj la aferoj kiuj estas mia devo.
- A. Bone dirita. Je l'kioma horo vi leviĝas?
- B. Je la sesa horo, tiel en la somero kiel en la vintro.
- A. Kaj vi vin kuŝigas?
- B. Je la deka.
- A. Mi penos sekvi vian ekzemplon.
- B. Kaj vi faros bone. Dume vi ne eliris ankoraŭ el la lito.
- A. Jes, je vero! Nun, mi estas sur la piedoj. Mi min vestas.

La kuŝigado.

- B. Nu, ĉu vi estas kontenta je via tago?
- A. Ne malbone; sed mi konfesas al vi, ke mi estas tre laca. Mi min senvestigas kaj min kuŝigas tuj; post kvin minutoj mi jam ne estos de tiu-ĉi mondo.
— Johano, donu al mi la bottirilon, la pantoflojn kaj mian ĉapon de nokto.
- J. Jen ili estas, sinjoro.
- A. Ĉu vi fermis la kovrilojn de fenestro.
- J. Jes, sinjoro.
- B. Vi farus pli bone lasi ilin malfermitaj.

- A. Kial?
- B. Por vidi pli rapide la sunon.
- A. Mi estas ne inda miri la ŝtelon de l'tago.
- B. Kie estas viaj bonaj projektoj de l'mateno.
- A. Mi nenion scias; ĉio kion mi scias en tiu-ĉi punkto estas ke mi falas de l'dormeco.
- J. Je l'kioma horo mi devas vin veki, sinjoro?
- B. Je la sesa.
- A. Johano, mi vin forpelos, se vi havos la malfeliĉon kaj vekos min antaŭ la deka. Kuntiru la kurtenojn de l'lito.
— Ho, lito feliĉa! Benata estu, kiu elpensis la litojn.
- B. Tio-ĉi estas via preĝo vespera.
- A. Kara amiko, vi min enuigas multege; lasu min dormi. Feliĉan nokton.
- B. Dante estis prava dirante ke l'Infero estas pavimita per bonaj intencoj.

La matenmanĝo.

- A. Mi vin salutas, sinjoro. Kio faras al mi la honoron de via vizito?
- B. Mi venas paroli kun vi pri afero bonega, per kiu oni povos gajni monon.
- A. La monon oni neniam malakceptas.
- B. Ni parolos pri nova fervojo kiu . . .
- A. Pardonu, se mi vin interrompas, sed tio-ĉi estas mia horo de matenmanĝo, kaj mi mortas de malsato.
- B. Tial vi ankoraŭ nenion manĝis.
- A. Efektive.
- B. Mi komprenas, la ventro malsata ne havas orelojn.
- A. Faru al mi la ĝentilecon matenmanĝi kun mi; poste ni babilos pri aferoj kiom vi volos.
- B. Kutime mi ne matenmanĝas tiel frue, ĉar levante min el la lito mi trinkas kafon kun kremo; tamen por fari al vi societon mi manĝos iometon.
- A. Johano! Ĉu estas preta la matenmanĝo?
- J. Jes, sinjoro, kaj vin atendas sur la tablo.
- A. Tiu-ĉi sinjoro manĝos kun mi.
- J. Tre bone. Tuj mi metos duan manĝilaron.
- A. Mi devas diri al vi antaŭ ĉio ke mi havas la principon neniam

fari du aferojn je unuĉfojo. Estas tempo por ĉio, diras la proverbo.

J. Sinjoro estas servita.

A. Ni iru en la salonon por manĝi. Sidigu. Ĉu mi povas proponi al vi ostrojn?

B. Mi prenos kelkajn.

A. Permesu, ke mi en-verŝu al vi glason dal' vino blanka. Ĝi estas Chablis maljuna, benega kun ostroj.

B. Donu al mi tre malmulte; mi ne havas la kutimon trinki vinon al la matenmanĝo.

A. Vi prenos koteleton aŭ bifstekon?

B. Mi dankas, mi ne estas tre malsata. Donu al mi pli bone flugilon de kokido.

A. Se vi ne havas malsaton, permesu, ke mi donu al vi tiun-ĉi koturnon.

B. Ĝi estas bonega; estas nek tro grasa nek tro malgrasa.

A. Mi multe ĝojas, ke ĝi estas laŭ via gusto. Mi mem mortigis ĝin antaŭhieraŭ.

B. Vi trovas tiel la tempon por iri ĉasi?

A. Kaj kial ne? Ĉasi mi iris kun kelkaj amikoj en unu el miaj teroj kiu estas dekkvin kilometrojn de tie-ĉi.

— Sed vi ne trinkas. Prenu iom de tiu-ĉi vino bordò, ĝi estas dekdu jarojn en la botelo kaj certe ne povas fari al vi malbone.

B. Mi dankas, mi jam ne trinkos pli; eble alian fojon.

A. Mi vere hontas de mia apetito, vidante vin manĝi tiel malmulte.

A. Bone, mi prenos iom da fruktoj.

A. Prenu pli bone pecon da fromaĝo, tio-ĉi vin igos trinki.

B. Mi konfesos al vi, ke tiu-ĉi afero pri la fervojo min tiel interesas, ke mi ne povas eĉ bone matenmanĝi.

A. Amiko mia, vi estas malprava; unu afero ne devas malhelpi la alian. Ni iru en mian ĉambron. Ni trinkos kafon aŭ teon kaj ni parolos serioze pri la afero, kiun vi proponas al mi.

La tagmanĝo.

A. Bonan tagon, kara amiko. Jen vi revenis el via vojiro. De kia tempo vi estas en Parizo?

B. De hieraŭ vespere. Mia unua vizito estas al vi.

A. Vi estas tre ĝentila. Mi esperas ke vi faros al mi la plezuron tagmanĝi kun mi.

B. Estas demando grava, kiu postulas pripenson.

A. Mi komprenas. Ne timu; mi vin ne invitas al tagmanĝo sencere-
monia.

B. Mi scias bone ke vi neniam farus al mi tian perfidaĵon.

A. Kaj efektive ĝi estus perfidaĵo. Mi konas tro bone viajn teo-
riojn gastronomiajn kaj ne invitus vin por ke vi dividu kun
mi, kion donis la okazo.

— Se oni vin igis eniri en la kabineton, ĝi estis tial, ĉar en
la salono sin trovas personoj kaj ke ni devis pasi en la
manĝejon.

B. En tiu-ĉi okazo ni ne perdu la tempon; tagmanĝo revarmigita
neniam povas esti bona.

* * *

A. Kiel vi trovas la supon?

B. Bonega; mi vidas ke via kuiristo estas homo de bona gusto.

A. Glaseto da madera post la supo neniam faras malbone.

B. Kontraŭe, bonege.

A. Ĉu mi povas proponi al vi tranĉon da bova viando aŭ eble vi
volas bifstekon?

B. Mi amas la bifstekon duone rostitan, sed mi devas konfesi, ke
mi havas malfortecon por la viando bova.

A. Prenu, mi petas: Jen estas bakitaj terpomoj, kukumetoj kaj
mustardo.

B. Mi komprenas, kial la Angloj faras la bovaĵon la fundamento
de ĉiuj siaj manĝoj. Ĝi estas la sola, por kiu oni neniam
perdas la guston.

A. Ĉu vi amas la spinakon?

B. Mi diros al vi, kiel iu diris: mi estas kontenta ke ne, ĉar se
mi ĝin amas, mi ĝin manĝus, kaj mi ne povas ĝin suferi.

A. En tia okazo prenu floran brasikon aŭ alian legomon.

B. Kiel belan salmon oni tie enportas! Estas je vere fiŝo mirinde
bela.

A. Jen estas la saŭco de kaporoj.

B. Mi ĝin pli amas kun oleo kaj vinagro.

A. Ne forgesu ke la fiŝoj volas naĝadi.

B. Ne timu, via maljuna vino de Bordo sin rekomendas si mem.

A. Estu tiel bona kaj preparu la salaton dum mi tranĉos la rostaĵon.

- B. Kun plezuro. Johano, donu al mi la salon kaj pipron, oleon kaj vinagron! Estas nun snfĉe miksitaj; rigardu ĉu ĝi estas laŭ via gusto.
- A. Bonega. — Se vi amas la sovaĝon, prenu, mi petas, peceton da kapreolo.
- B. Mi diros al vi, ke tiu fazano jam turnis mian atenton; estas nun la vera momento por ĝi.
- A. Kiel vi ĝin trovas?
- B. Via kuiristo estas granda homo; jen ĉio, kion mi povas respondi.
- A. Mi esperas ke vi estos egale kontentigita de la postmanĝo. Ni havos fromaĝon tre bongustan kaj ĉiajn specojn de fruktoj; ni trinkos certan ĉampanon rozan kiu havas sian meriton.
- B. Kara amiko, vi donis al mi tagmanĝon de princo. Kiam mi ekpensas ke estas homoj kiuj eĉ ne scias, kio estas tagmanĝo!
- A. Ni bedaŭru ilin, sed nin gardu, ke ni ilin ne sekvu.
- B. Prezentu al vi, ke en la lasta tempo mi renkontis personon, kiu certigadis, ke oni tagmanĝas plene kun supo, viando kuirita, legomo, rostaĵo kaj salato.
- A. Por via individuo mi sentas kompaton.
— Tagmanĝo komforta devas esti kunmetita de supo, kokido kuirita aŭ rostita, varma aŭ malvarma, de sovaĝo, manĝoj raraj kaj elektitaj, de fiŝoj, sukraĵoj, pasteĉoj kaj fruktoj.
- B. Tion-ĉi mi respondis al li, sed mia kontraŭisto eĉ ne pensis esti venkita. Li eĉ volis min kredigi ke oni devas manĝi por vivi, kaj ne vivi por manĝi.
- A. Sen dubo ia malriĉa diablo! Diru al mi kion vi manĝas, kaj mi diros al vi kiu vi estas.
- B. Je l' fino, ne estas granda malfeliĉo, ke ekzistas tiaj originaloj; alie la bonaj mordetoj fariĝus raraj por la konantoj.
- A. Vi estas prava: oni faras bone lasante la antaŭjuĝojn al la popolo.

Restoracio.

- A. Kelnero (ĉambristo), ĉu ni povas havi apartan ĉambron?
- G. Jes, sinjoroj, volu iri, mi petas, sur la unuan etaĝon.
- B. Donu la karton!
- G. Jen estas. Per kia supo mi devas servi al la sinjoroj?
- A. Donu unue tri dekduojn da ostroj kaj vinon blankan.
- G. Ĉu vi deziras vinon ordinaran?
- A. Ne, alportu vinon maljunan de Sauterne.

- B. Metu la manĝilaron sur la tablon, kiu estas proksime de la fenestro.
- A. Tiu-ĉi telero ne estas pura, metu alian!
- B. Tiu-ĉi tranĉilo tranĉas malbone.
- A. Donu freŝan panon, tiu-ĉi estas malmola.
- B. Forprenu tiujn-ĉi telerojn kaj donu supon de . . .
- A. Ni ne havas kuleron disverŝan.
- G. Ordonu du porciojn da bova restaĵo kun fungoj.
- A. Ĉu vi havas fiŝon tute freŝan?
- G. Ni havas karpojn kiuj venas rekte el la rivero.
- B. Donu alian forketon kaj puran teleron.
- A. Ĉu vi havas viandon de sovaĝo?
- G. En tiu-ĉi momento, ne, sinjoro: la ĉasado ne estas ankoraŭ permesita.
- A. Tiu-ĉi oleo ne estas bona.
- G. Ĝi estas tamen oleo d' Aix.
- A. Eble, sed devas esti jam longa tempo, ke ĝi ne vidis la belan ĉielon de Provence.
- B. Kiajn legomojn vi havas?
- G. Pizetojn kaj brasikon de Bruxelles.
- A. Alportu kokidon rostitan kaj salaton.
- B. Kelnero, donu al ni botelon de vino Pouilly kaj aliajn glasojn.
- G. Kian postmanĝon deziras la sinjoroj?
- A. Fromaĝon de Roquefort kaj pirojn.
- B. Donu la kalkulon.
- G. Jen, sinjoroj. Havu la bonecon pagi en la kontoro.
- B. Tre bone; jen por vi.

En kafejo.

- A. Ni eniru en la ĉambron por fumantoj.
- B. Servanto! du glasojn da kafe kaj du glasetojn da konjako.
- G. Jen, sinjoroj, mi petas. Ĉu vi deziras kremon?
- A. Ne, mi trinkas nur kafon nigran.
- B. Junulo! enverŝu al mi multon da kafe, mi diros al vi poste la kaŭzon. — Bone. — Nun enverŝu multon da kremo, mi diros al vi kial.
- Nu, mia kara A***, kian novaĵon vi havas por rakonti?
- (Al la servanto.) Kion vi faras tie-ĉi? Ni jam nenion pli bezonas.

- G. Mi atendas, ĉar la sinjoro volis diri, kial li postulis multon da kafo kaj multon da lakto.
- B. Ha! efektive; por povi enmeti multon da sukero.
- G. (Al si.) Bela pravo por igi min atendi.
- A. Donu la alumetojn.
— Kiel vi trovas tiun-ĉi kafon?
- B. Ĝi estas tre bona, Moka pura sen aldono de cikorio.
- A. Mi konfesas, ke mia plej granda plezuro estas eltrinki post bona tagmango bonan glason da kafo.
- B. Sed la kuracistoj diras ke tiu-ĉi trinkaĵo tre malutilas al la sano.
- A. Jes, ili kredigas, ke ĝi estas malrapida veneno kaj ili estas pravaj.
- B. Vi kredas?
- A. Rigardu la maljunan sinjoron kiu legas la ĵurnalon!
- B. Tiun, kiu havas la harojn tute blankaj?
- A. Tiun-ĉi saman. Kion vi pensas? Kian aĝon li havas?
- B. Li havos ne malpli ol okdek jarojn.
- A. Bone! Tiu-ĉi maljunulo estas de kvardek jaroj gasto konstanta de tiu-ĉi kafejo, kien li venas regule por sin veneni en ĉiu tago, kiun Dio donacas al li.
- B. Efektive, la kafo devas esti veneno tre malrapida. Sed kion vi pensas pri la teo?
- A. La teo malforta malbonigas al mi la stomakon, la teo forta estas laŭ mia gusto sed min denervas kaj malhelpas dormi.
- B. Ĝi estas trinkaĵo, kies indon sole komprenas la sinjorinoj.
- A. Povas esti; mi mem devas konfesi, ke mi plivolas glason da grogo aŭ punĉo, kaj eĉ da biero.
- B. Mi ne povas diri tion-ĉi, sed oni ne devas disputi pri gustoj: „de gustibus non est disputandum“.

Sur la fervojo.

- La konduktoro. Sinjoroj vojirantoj, mi petas sidiĝi.
- A. Ni iru, rapide, sidiĝu.
- B. Ne metu nin tiel proksime de la lokomotivo.
- A. Ni penu ricevi lokon proksime de l' pordo.
- B. Mi plivolas turni la dorson al la lokomotivo por ne havi la venton kaj polvon.
- A. Mi aŭdas la trian sonoradon; ni forveturas.
- B. Jen la fajfo de l' forveturo. — Kiel longa estas la vagonaro!

- A. Ne elmetu la kapon tra l' fenestro. — Vi scias eble, ĉu la vagonaro haltas en X?
- B. La libreto de vojo diras ke ĝi pasas sen ekhalto.
- A. Mi aŭdas fajfon de vagonaro kiu alvenas.
- B. Kia rapideco!
- A. Ni jam transkuris tri kilometrojn.
- B. Rigardu la belan viadukton, kiun ni tuj traveturos.
- A. Ŝajnas ke ĝi estas tiel solida kiel bela.
- B. Tenu pretè vian bileton.
- A. Kial?
- B. Ĉar oni devas montradi ĝin ĉie: ĉe l' enirado en la atendejon, sur la stacio de alveno kaj dum la veturado je ĉiu postulo de la kontrolistoj.
- A. Kaj se min ĝin perdis?
- B. Vi pagus la koston de via loko, kalkulitan de l' distanco la plej malproksima.
— Vi sen dubo enskribigus viajn pakaĵojn?
- A. Jen estas la karto de ricevo, kiun oni donis al mi.
- B. Konservu ĝin bone, por povi ĝin redoni ĉe la repreno de via vestaĵo.
- A. Kiam ni haltos por matenmanĝi?
- B. Post duonhoro ni estos en la bufedo.
- A. Tiom pli bone, ĉar mi komencas senti malsaton kaj soifon.
Kiel longe oni haltas?
- B. Bonan kvaronon da horo.
- A. Kiel sin nomas tiu-ĉi stacio?
- B. Tio estas la stacio G.
- A. La vojisto faras signojn kaj la vagonaro haltas. Ŝajnas al mi ke la maŝino eliras el la reloj kaj ke la kaldrono perdas vaporon tra la ventoliloj.
- B. La timo vin igas vidi multajn aferojn. La maŝinisto ekpemis la haltilojn ĉar ni proksimiĝas al ŝanĝejo de reloj.
- A. Kio estas la nigra subteraĵo kiun mi vidas tie malsupre.
- B. Tunelo.
- A. Mi ne amas traveturi tunelojn.
- B. Mi ankaŭ ne, aparte se ili ne estas bone lumigataj.
- A. Ĉu estas tre longa tiu-ĉi subteraĵo.
- B. Ne tro longa, sed sufiĉe profunda.
- A. Dank' al Dio! jen ni elveturis el tiu-ĉi profundaĵo.

- B. Kaj jen ni alvenis al la bufedo.
A. Tiom pli bone.
K. (Malfermante la pordon.) Eliru, sinjoroj; vi havas kvaronon da horo de ripozo.
A. Kie estas la bufedo?
K. Ŝtuparo dekstren, pordo rekten.

* * *

- A. Jen ni estas iom refortigitaj. Se ni ekbruligus cigaron?
B. Estas malpermesita la fumado en la vagonoj kaj en la ĉambroj de stacio.
A. Sed vojirante de Strasburgo al Bazileo mi fumis.
B. Ĉar tie estas vagonoj por fumantoj.
A. Tial ni babilu iom.
B. Volonte, sed pri kio?
A. Donu al mi malgrandan ideon pri lokomotivo.
B. Estas maŝino kvar — aŭ sesrada kun forno, kamento, kaldrono kaj unu aŭ pli vaporaj cilindroj, kies piŝtoj metas en movadon kelkajn stangojn de fero, kiuj komunikas ilian movon al la radoj.
A. Sed kiel la vaporo de akvo povas movadi la piŝtojn de la cilindroj?
B. La vaporo eniras alterne de la du flankoj de l' piŝto kaj eliras de l' flanko kontraŭa en la atmosferon.
— La movo „tien-reen“ rezultanta estas transmetata al la radoj per helpo de kunigiloj genuaj.
A. Tial la movo de l' piŝto estas la ĉefa movilo de ĉiuj tiaj maŝinoj.
B. Efektive. Ili estas kun alta aŭ malalta premo, laŭ la nombro da atmosferoj kiujn ili povas porti; la maŝinoj de la fervojoj estas kun alta premo.
A. Vidu! kiel la tempo pasas dum la babilado. Jen ni estas sur nia stacio.
B. Ni iru serĉi niajn pakajojn.

Sur la maro.

- B. Jen fine ni estas sur la ŝipo.
A. Tio min ne ĉagrenas. Kia malprudenta elpenso estas tiuj ŝtuparoj de ŝnuro! Mi preskaŭ rompis al mi la kolon.

- B. Estas via kulpo; vi devis teni vin bone.
- A. Eble estas mia kulpo, sed kion vi dirus, se estus veninta ekblovo de vento, dum ni estis en la malbenita ŝalupo?
- B. Kredeble nenion, ĉar la ŝalupo sin estus renversinta, kaj ni estus ĉiuj trinkintaj gluton da akvo.
- A. Vi prenas ĉion filozofe; sed mi konfesas al vi, ke mi volus jam esti elirinta el tiu-ĉi malbenita ŝipo kiun pestigas la malbona odoro de gudro.
- B. Ĉu la odoro de l' gudro faras al vi malbone?
- A. Mi nescias, sed mi havas grandan doloron de l' kapo, kaj malvarmon en la tuta korpo.
- B. Trinku glaseton da brando de ginëpro.
- A. Mi plivolas eltiri min sur mia hamako; eble tio-ĉi min helpos.
- B. Vi ŝanĝas la koloron. Kio estas al vi?
- A. La kapo sin turnas al mi; mi devos vomii. (Kriante.) Vazon! vazon!
- B. Jam tiel rapide? Kaj tamen la maro estas sufiĉe trankvila, kaj apenaŭ ni elveturis el la haveno.
- A. Mi mortas.
- B. Konsolu vin, oni ne mortas je l' malsano de maro.
- A. Mi suferas terure.
- B. Ĝi pasos.
- A. Mi sentas min iom pli bone.
- B. Eliru ni sur la ponton; aero libera faros al vi bone.
- A. Ho! kia vento! — Mia ĉapo falis en la maron! Haltu, haltu!
- B. (Ridante.) Haltigu la radojn, konduktoro, haltigu!
- A. Kia ĉagreno! Ĉapo por dek frankoj
- B. Kiu servos nun kiel kapa kovrilo al iu mara bovido (foko).
- A. (Sin returnas kolere kaj foriras.)
- B. He! sinjoro A., ne tenu la genuojn tiel rekte; alie la mara malsano vin ree ekkaptos.
- A. Vi parolas serioze?
- B. Aŭskultu. Se vi tenos la genuojn iom fleksitaj, kiel faras la maristoj, via korpo restos en ripozo kaj la movo de la vaporŝipo ne venos en kontraŭecon kun la movo de l' stomako.
— Se vi marŝados kiel prusa grenadisto, tuta via korpo estos skuata, kaj tiam estas ankaŭ nature ke . . .
- A. Mi komprenas, komprenas. Ni ekprovu la paŝadon de la maristoj!

(Faras du paŝojn kaj falas.)

- B. Mi pensis ke vi estas pli lerta.
- A. Sinjoro, mi ne kredas ke estas iu pli lerta ol mi. Ne mi, sed la vaporsĥipo faris falsan paŝon.
- B. Bonege!
- A. La maro estas maltrankvila; mi nur deziras, ke ni alvenu en sendanĝeran havenon!
- B. Ne timu, la vento estas favora al ni kaj la ŝipo estas forta kaj iras kun granda rapideco.
- Rigardu kiel ĝi estas bone konstruita.
- L' antaŭo estas tiel maldika, ke la prismo de akvo estas nur flanke forigata kaj kun la plejmalgranda ebla rapideco.
- La flankoj de l' vaporsĥipo havas nek levaĵojn nek malegalaĵojn; ili estas tute glataj.
- La posta parto estas preskaŭ tiel maldika kiel la antaŭa kaj formas kurbojn tute konvenajn kun la flankoj.
- La maŝinoj, lokitaj en malgranda vasto, estas fortikaj kaj malpezaj.
- A. Kiel oni faras por doni regulecon al la movado de l' trabo (arbo), kiun turnas la maŝinoj.
- B. La du maŝinoj turnas du manetojn kiuj estas alfortigitaj ĉe la finoj de tiu-ĉi arbo kaj formas rektan angulon unu kun la alia.
- Tial, kiam la unua maŝino sin trovas en la punkto plej viva de sia kuro la dua estas en la punkto morta; el kio rezultas, ke la laboro de l' tuta sistemo estas ĉiam la sama.
- A. Via klarigo min interesis, sed mi volus jam esti alveninta en D.
- Mi estas laca, promenadi el la antaŭo de l' ŝipo al la posto, el la suba bordo al la supra bordo, aŭdadi la bruon de la radoj, la kriojn de la maristoj, vidadi sole ĉielon kaj akvon kaj la nigran vaporon, kiun vomas la kameno.
- B. Rigardu antaŭ vin. Kion vi vidas?
- A. Mi vidas ion kiel nubo blanketa.
- B. Tio estas la bordoj de ***, kaj en du horoj ni estos en la haveno de D.
- A. Dank' al Dio!
- B. Ĉu vi konas bonan hotelon en D.?
- A. Mi aŭdis kiel oni parolis pri la hotelo sub la Ora Leono, sed mi ĝin konas sole per la nomo.

- B. Nenio embarasas tiel la vojiranton kiel la elekto de hotelo en urbo, kien oni alvenas je l' unua fojo.
- A. Jam ne je tio-ĉi mi zorgas, sed oni esploros niajn kofrojn en la depagejo . . .
- B. Oni volos vidi la pasportojn . . .
- A. Oni renversados nian vestaĵon.
- B. La veturigistoj min trenos maldekstren . . .
- A. La ĉambristoj de hotelo min trenos dekstren . . .
- B. Dume la portistoj jam forkuris kun niaj pakaĵoj.
- A. Atendante la diversajn plezurojn jen ni estas en la haveno. Ni tuj eliros el la vaporŝipo.

III.

Dialogoj.

El komedio de Goldoni: „l' Amore paterno“ (la Amo patra).

Dialogo unua.

Pankracio kaj Klariĉe.

Pankracio. Kara filino, mi estas ĉagrenita, senespera.

Klariĉe. Patro mia kara, konsolu vin, trankviliĝu.

Pankracio. Kiel vi volas, ke mi min konsolu?

Jen ni estas en Parizo ĉirkaŭ tri monatojn. La morto ne-atendita de mia frato, per kies helpo, por tiel diri, mi vivis, la leĝoj de l' lando, kiuj ne permesas al mi heredi ion, min metas en la plej grandan senkonsilecon de l' mondo.

Klariĉe. Patro mia, la plej granda bono de tiu-ĉi vivo estas la trankvileco de l' animo, la rezignacio kaj la indiferenteco.

Ridu je la fortune, ŝi povas forpreni al ni ĉion, ekster la virto, kaj ni perdas nenion, se tiu-ĉi lasta restas al ni.

Pankracio. Tial vi konsilas al mi resti?

Klariĉe. Jes, mia patro, sen ia malfacilo. La zorgeco kiun montras al ni Lukrecia, kaŭze la estimo kiun ŝi havis por via frato, estas providenco por ni, kaj ni estus sendankaj al la Providenco, se ni ne uzus ĝiajn bonfarojn.

Pankracio. Ĉu estas eble ke iu homo merita ne enamiĝos en vian virton?

Klariĉe. Vere, vi min igas ruĝiĝi.

Pankracio. La malmultaj Italoj, kiuj faras al ni la honoron veni tien-ĉi kelkfoje, ne satigas vin laŭdi.

Klariĉe. Ili estas plenaj de boneco, de ĝentileco.

Pankracio. Kion vi pensas pri ili?

Klariĉe. Sinjoro Ĉelio havas bonajn manierojn, estas ĝentila, sed ŝajnas al mi iom tro viveca. Sinjoro Silvio havas spiriton pli trankvilan, sed li estas tro serioza. Sinjoro Florindo scias iom, sed estimas sin tro multe; kaj la sinjoro Petronio nenion scias, hontas scii nenion kaj laŭdas kaj mallaŭdas kion laŭdas aŭ mallaŭdas la aliaj.

Pankracio. Tre bone. Oni ne povas pentri pli bone la karakteron de tiuj-ĉi kvar personoj. La ĉielo, en mia malfeliĉo donis al mi la kontentigon havi du filinojn, kiuj estas du orakoloj. Vi estas bonega en la sciencoj, kaj Anĝelika' en la kantado.

Klariĉe. Patro mia, la amo vin faras tro karesema. Ne juĝu nin per pasio.

Dialogo dua.

Anĝelika kaj la diritaj.

Anĝelika. Mia patro, mi venas por diri al vi aferon, kiu faros al vi plezuron.

Pankracio. Jes: konsolu min, mi ĝin bezonas.

Anĝelika. Mi finis en tiu-ĉi momento meti en muzikon la kanton, kiun Klariĉe komponis.

Pankracio. Tre bone! kiam ni ĝin aŭskultos?

Anĝelika. Kiam vi volas.

Pankracio. Ni atendu ĝis kiam ni havos gastojn. Je l' tagmezo venos niaj amikoj. Vi kantas kaj vi zorgos pri la gastoj.

Anĝelika. Sed, patro, mi ĝin faris por mia ekzercado, por mia plezuro, kaj mi ne havas la meriton nek lertecon por plaĉi.

Pankracio. Kion vi diras? vi estas fluto, kanario, najtingalo; vi havas lertecon mirindan.

Anĝelika. Tro multe, tro multe, mia patro. Memoru ke la amo propra ofte senvidigas. Mi ne scias, ĉu mi kantas tiel bone, kiel vi diras; sed se ĝi estus vera, tio-ĉi ne sufiĉas por plaĉi. Oni devas havi la feliĉon ekkapti la guston de la personoj kiuj nin aŭskultas.

Pankracio. En Francujo oni distingas la meriton; vi ne povas erari.

Anĝelika. Ni lasu la meriton flanke: tie-ĉi la gusto de la muziko estas diferenca.

Pankracio. Kion vi pensas pri la muziko de tiu-ĉi lando?

Anĝelika. En ĉiuj landoj de l' mondo, por ke io plaĉu, oni bezonas havi la orelojn kutimintaj ĝin aŭdi. La belaĵon kaj la bonaĵon oni konas sole per la komparado. Se oni komparas senpasie, oni trovas la bonaĵon ĉie; se la animo estas kontraŭema, oni povas enui de ĉiu flanko.

Pankracio. Vi parolas kiel la granda virtuoziĉino, kiu vi estas. Ĉu longa estas la kanto, kiun vi metis en muzikon?

Anĝelika. Tre mallonga. En tio-ĉi mi sekvis la guston francan. Tie-ĉi oni amas ke la pecoj estu mallongaj kaj oni estas tute prava. Ĉe ni, la pecoj muzikaj estas eternaj, kaj tiom da ripetoj malplaĉigas la plej belajn ariojn de l' mondo.

Dialogo tria.

Lukrecia, Skapino, Ĉelio kaj poste Silvio.

Lukrecia. Venu, Skapino. Metu tie-ĉi la tableton kun la spineto *), kaj tie-ĉi ĉirkaŭe la seĝojn kiuj povos esti bezonaj.

Skapino. Mi tuj servas al vi. (Iras serĉi la tableton.)

Lukrecia. Tiuj-ĉi bonaj filinetoj de l' sinjoro Pankracio havas meritojn, kaj mi ĝojas, ke oni ilin konas kaj aŭdas. Kiu scias, ĉu iu, enamiĝinte en ilian virton, ne decidiĝos edziĝi je ili? Mi ne ĉesos laboradi por ilia feliĉo.

Skapino. (Kun tableto.) Jen ĝi estas. Ĉu ĝi staras bone tie-ĉi?

Lukrecia. Tre bone. Alportu, mi petas, la spineton.

Skapino. Kun plezuro. (Foriras pro la spineto kaj revenas.) Jen la spineto.

Lukrecia. Tre bone. Metu ĝin sur la tableton.

Ĉelio. Neniu tie-ĉi? (el ekstere).

Lukrecia. Venu, venu, sinjor' Ĉelio. (Tio-ĉi estus bona partio por unu el la filinoj de l' sinjoro Pankracio. Mi volas vidi, ĉu mi povas ĝin ebligi . . .)

Ĉelio. Bonan tagon, sinjorino Lukrecia.

Lukrecia. Via servantino, sinjoro Ĉelio.

*) muzika instrumento.

Ĉelio. Vi fartas bone?

Lukrecia. Tre bone, mia sinjoro.

Ĉelio. Kiel fartas fraŭlino Klariĉe!

Lukrecia. Tre bone. Tuj, tuj vi ŝin vidos. Ŝi venos tien-ĉi kun fraŭlino Anĝelika', sia fratino.

Ĉelio. Mi salutos ilin du kun plezuro; sed pli multe min interesas fraŭlino Klariĉe, ĉar ŝi havas spriton kaj sciadon. Fraŭlino Anĝelika' havas ankaŭ sian meriton; sed mi ne komprenas la muzikon, kaj al tio mi scias bone ke ŝi naskigis la amon en la koro de l' sinjoro Silvio, kaj mi ne volas malhelpi al amiko.

Lukrecia. Mi ne sciis ke sinjor' Silvio havis tian inklinon por fraŭlino Anĝelika! Li estas homo kiu parolas malmulte, kaj ne lasas sin ekkoni tiel facile.

Ĉelio. Li estis jarojn en Anglujo kaj alprenis la kutimojn anglajn. Mi, kontraŭe, forlasinte Italujon, venis Francujon, kaj mi tie-ĉi estas, kiel vi scias, de longa tempo; mi alprenis la kutimojn de tiu-ĉi nacio, tio estas, la malkovritecon kaj la liberecon; mi amas fraŭlinon Klariĉe', kaj mi ĝin diras libere, kaj tute min ne tuŝas, ke la tuta mondo ĝin scias.

Lukrecia. Multe plaĉas al mi, ke vi ŝin amas. Ŝi estas bonega junulino, vi estas homo honesta kaj de bona deveno, kaj mi multe ĝojas vidi tiun-ĉi edziĝon. Jen la sinjoro Silvio; sidiĝu, tuj venos fraŭlino Anĝelika.

Ĉelio. Amiko, via servanto.

Silvio. (Lin salutas sen paroli.)

Ĉelio. Kiel vi fartas? via sano?

Silvio. Mi fartas bone. (malkontente.)

Ĉelio. Vi koleras, ĉar mi demandas, kia estas via sano.

Silvio. La tuta mondo faras al mi la saman demandon. Mi ne kredas ke mi havas vizaĝon de malsanulo.

Ĉelio. Tio estas komplimento kiun oni faras kutime.

Lukrecia. Jen la fraŭlino Klariĉe'.

Dialogo kvara.

Klariĉe, la diritaj kaj poste Anĝelika.

Klariĉe. Via servantino, sinjoroj. (Silvio ŝin salutas sen paroli.)

Ĉelio. Via plej humila servanto, fraŭlino Klariĉe.

Lukrecia. Volu sidiĝi, sinjoroj, mi petas ĝentile. (Ĉelio sidiĝas dekstre de Klariĉe, kaj Silvio malproksime de ili ĉe la spineto.)

Klariĉe. Tiel malproksime, sinjoro?

Silvio. Pardonu min. Mi amas la spineton senfine.

Ĉelio. Lasu ni sinjoron Silvio en sia libereco, kaj vi permesu al mi, ke mi uzu tiujn-ĉi feliĉajn momentojn por diri al vi, ke mi vĥn amas kore, kaj mi estas sorĉita de via merito kaj de via beleco.

Anĝelika. Via plej humila servantino, sinjoroj.

Silvio. (Sin levas kaj ŝin salutas sen paroli.)

Ĉelio. Mi vin salutas, fraŭlino Anĝelika. Kia estas la sano?

Anĝelika. Bona, mi dankas.

Silvio. Ankaŭ la fraŭlinon vi demandas, kia estas ŝia sano? (al Ĉelio).

Ĉelio. Kaj kial mi ne devus demandi tion.

Silvio. Ŝia vizaĝo vin povas liberigi de tiel enua demando.

Ĉelio. Jen homo kiu volas reformi la uzaĵon.

Anĝelika. Sidiĝu, sinjoroj, ne staru el mia kaŭzo.

Ĉelio. Sidiĝu, se vi volas, ke ni sidiĝu.

Anĝelika. Kun plezuro. (Volas sidiĝi en la mezo.)

Silvio. Fraŭlino, pardonu min. Jen estas via loko. (Montras al ŝi la seĝon ĉe la spineto.)

Anĝelika. Ĉu mia patro tie-ĉi ne estas? Faru al mi la plezuron diri al li, ke li venu. (Mallaŭte al Lukrecia kaj iras sidiĝi ĉe la spineto, dekstre de Silvio.)

Silvio. Tiu-ĉi muziko estas via? (Al Anĝelika montrante al ŝi kelkajn foliojn de muziko, kiuj estas sur la spineto.)

Anĝelika. Jes, sinjoro, malgranda peco sen ia merito.

Silvio. Faru al mi la plezuron aŭskulti, ĉu mi ĝin komprenas.

Anĝelika. Vi ĝin komprenos sen ia malfacileco. (Ili restas ambaŭ okupataj je analizado de la muziko.)

Ĉelio. Mi kredas, ke sinjor' Silvio estas pli feliĉa ol mi. (Al Klariĉe.)

Klariĉe. Permesu, mi kredas ke sinjoro Silvio estas pli diskreta ol vi.

Ĉelio. Kaj kial, fraŭlino?

Klariĉe. Li ne havas la kuraĝon klarigi sin al mia fratino, kiel vi faris kun mi.

Ĉelio. Ĉar li ne amas tiel forte kiel mi.

Klariĉe. Se via amo estas vera, kial vi ne diras pri ĝi, al kiu estas konvene?

Ĉelio. Kaj al kiu mi devus min klarigi?

Klariĉe. Al mia patro.

Ĉelio. Al via patro? Mi obeas.

IV.

Dialogoj el Lukianos.

Hefajstos kaj Apollon.

Hefajstos. Ĉu vi vidis, Apollon, la novenaskitan infanon*) de Maja? Kiel bela ĝi estas, al ĉio ridetas, kaj jam montras, ke el ĝi estos io tre bona!

Apollon. Io tre bona, Hefajstos, el tiu infano, kiu pro siaj malhonestajoj jam estas pli maljuna ol Japetus?

Hefajstos. Kaj kian maljustecon povus fari la novenaskita?

Apollon. Demandu Posejdonon, al kiu ĝi ŝtelis la tridenton aŭ Areson, ĉar ankaŭ al tiu-ĉi ĝi eltiris sekrete la glavon kaj glavujon, se mi ne diros, ke ankaŭ al mi mem li forprenis la pafarkon kaj la sagojn.

Hefajstos. Tion-ĉi faris la novenaskita, kiu apenaŭ staras sur la piedetoj kaj kuŝas ankoraŭ en la infanaj vindoj?

Apollon. Vi sciigos, Hefajstos, kiam unu fojon ĝi venos al vi.

Hefajstos. Ĝi jam estis ĉe mi.

Apollon. Nu, kaj kio? Ĉu vi havas ĉiujn laborilojn kaj nenia malestas?

Hefajstos. Ĉiujn, Apollon.

Apollon. Tamen bone rigardu!

Hefajstos. Pro Zeŭso, la kaptilon de fajro mi ne vidas!

Apollon. Sed vi vidis ĝin en la ĉirkaŭligiloj de la infano.

Hefajstos. Li ŝajnas esti tiel lertefingra, kiel se li jam longe estus lernanta la ŝteladon.

Apollon. Jes, vi ne aŭdis lin paroli multe kaj glate, sed li eĉ volas servadi al ni ĉe la tablo. Hieraŭ li elvokis Eroson al batalo, kaj tuj lin ĵetis, submetinte al li iel la piedon. Poste, dum la laŭdoj, kiujn li ricevis, li ŝtelis al Afrodite, ĉirkaŭprenanta lin pro lia venko, la zonon kaj al Zeŭs ankoraŭ

*) Hermes (Merkur) la dio de komercistoj kaj ŝtelistoj.

ridanta, la sceptron. Se la fulmilo ne estus tro peza kaj ne havus tro multe da fajro, li ĝin certe ankaŭ estus forpreninta.

Hefajstos. El la knabo vi faras efektivan diablideton.

Apollon. Ne sole, li ankaŭ jam estas muzikisto.

Hefajstos. Pro kio vi ĝin supozas?

Apollon. Trovinte ie malvivan testudon li faris el ĝia ŝelo muzikan instrumenton, alfortigis tenilojn kaj portilon, enbatis kordotirilojn kaj submetis selon, entiris kordojn kaj ekludis tiel melodie kaj harmonie, ke mi estis ĵaluza je li, kvankam mi jam longe ludas la citron. Maja diris, ke nokte li ne volas resti en la ĉielo, sed subiras ĝis en la inferon, nature por ŝteli ion ankaŭ tie. Li estas flugila kaj faris al si vergon kun mirindaĵa forto, per kiu li altiras la animojn kaj subkondukas la mortintojn.

Hefajstos. Mi ĝin donis al li kiel ludilo.

Apollon. Danka por tio, li al vi ŝtelis la fajrkaptilon.

Hefajstos. Bone, ke vi min memorigas, mi tuj iros ĝin serĉi kaj eble, kiel vi diras, ĝi troviĝos en la vindoj de l' infano.

Zeŭs, Asklepios kaj Herakles.

Zeŭs. Ĉesu, Asklepios kaj Herakles, kaj ne malpacu kiel homoj mortemaj; tio-ĉi estas malbela kaj ne konvena por la festa tablo de la dioj.

Herakles. Sekve vi volas, Zeŭs, ke tiu-ĉi farmacisto sidu super mi.

Asklepios. Nature, mi estas ja pli inda ol vi!

Herakles. Kial, malbenitulo? eble tial ke vin Zeŭs mortigis per fulmo, kiam vi faris kio ne estis permesita, kaj sole el kompato li donis al vi la nemortecon?

Asklepios. Ĉu vi jam forgesis, Herakles, ke vi bruliĝis sur la Oitos, ke vi riproĉas al mi la fajron?

Herakles. Ni vivis nek egale, nek eĉ simile, ĉar mi estas la filo de Zeŭs, por la purigado de l' vivo mi tiom batalis venkante bestojn sovaĝajn kaj homojn malpiajn; sed vi estas tranĉisto de radikoj kaj urba kriisto kaj eble uzinda por almetadi sanilojn al homoj malsanaj, — virecan vi nenion faris.

Asklepios. Ne, ĝi estis nenio, ke mi sanigis viajn brulvundojn, kiam antaŭ mallonge vi venis supren al ni duone bruligita, kiam la subvesto kaj poste la fajro vundigis al vi la korpon. Sed se mi povas diri pri mi nenion alian, tamen mi nek servis

kiel simpla laboristo kiel vi, nek kombis la lanon en Lyda vesto purpura, nek ricevis de Omfale batojn per ora pantoflo, eĉ ankaŭ mi ne mortigis en melankolio miajn infanojn kaj la edzinon.

Herakles. Se vi ne ĉesos min insulti, vi tuj sciigos, ke via nemorteco ne multon helpos al vi, ĉar mi vin ekkaptos kaj ĵetegos kun la kapo malsupren el la ĉiealo, ke eĉ Pajon mem ne sanigos al vi la rompitan kranion.

Zeŭs. Ekĉesu, mi diras, kaj ne malhelpu la societeton, aŭ mi forsendos vin ambaŭ de la komuna tablo? Cetere, ĝi estas prave, Herakles, ke Asklepios sidas super vi, kiel mortinta pli frue.

Hermes kaj Ĥaron.

Hermes. Se vi konsentas, transveturigisto, ni kalkulu, kion vi jam ŝuldas al mi, por ke ni poste ne malpacu ree pro tio.

Ĥaron. Ni kalkulu, Hermes; estos pli bone kaj pli simple se ni klarigos la aferon.

Hermes. Ankron mi alportis al vi laŭ via postulo por kvin drakmoj.

Ĥaron. Multe da mono!

Hermes. Pro Aidoneus (Ptuton)! mi ĝin aĉetis por kvin drakmoj kaj al la direktilo rimenon por du oboloj.

Ĥaron. Kalkulu 5 drakmojn kaj 2 obolojn.

Hermes. Poste grandan kudrilon por sentruigi la velon; mi pagis kvin obolojn por ĝi.

Ĥaron. Alkalkulu ankaŭ tion-ĉi.

Hermes. Kaj vakson por plenŝtopi la fendojn en la ŝipeto kaj najlojn kaj ŝnuregon, el kiu vi faris la velan stangon, kune por du drakmoj.

Ĥaron. Tion-ĉi vi aĉetis malkare.

Hermes. Jen estas ĉio, se ni ne forgesis ion dum la kalkulado. Kiam vi pensas doni al mi la monon?

Ĥaron. Nun, Hermes, ĝi estas tute ne eble; sed kiam la pesto aŭ la milito alportados al ni amase la mortintojn, tiam per eraro en la kalkulo de l'mono por la transveturigado oni povos ion meti flanken.

Hermes. Tial nun mi devas sidi kaj deziri, ke l'o plej malbona fariĝu, por ke mi ricevu mian monon?

Haron. Alie ĝi ne estas eble, Hermes; nun alvenas nur malmultaj al ni, kiel vi mem vidas, ĉar reĝas la paco.

Hermes. Tiel estas pli bone, se eĉ via ŝuldo sin iom laŭlonge eltiros. Sed vi scias, Haron, kiel elrigardis la homoj, kiuj antaŭe al ni venadis. Ĉio fortaj viroj, plenaj je sango kaj vivo, la plej ofte vunditaj; nun sole venas iu, kiun la filo aŭ la edzino mortigis per veneno, aŭ al kiu la vivo malbona elblovis la ventron kaj la membrojn, sole palaj mizeraj kreitaĵoj, eĉ ne similaj je tiuj. La plejmulto de la venantoj, kiel ĝi ŝajnas, penis forigi unu la alian el la mondo pro la mono.

Haron. Ĝi estas ja io multe dezirata.

Hermes. Tial oni ne devas min mallaŭdi, ke mi faras eraron, se mi postulas de vi severe kion vi ŝuldas al mi.

Pluton aŭ kontraŭ Menippos.

Krojsos. Ni ne povas elteni, Pluton, kune kun tiu-ĉi kiniko Menippos; tial aŭ forigu lin ien alien aŭ ni iros en alian lokon.

Pluton. Kion malbonan li faras al vi, estante ja tiel same mortinto kiel vi?

Krojsos. Kiam ni rememoras la aferojn en la supra mondo, Midas sian oron, Sardanapalos sian grandan lukson, mi, Krojsos, miajn trezorojn, kaj ni plendas kaj ĝemas, li ridas je ni kaj nomas nin malliberulojn kaj malnoblulojn; alitempe li malhelpas nian plendadon per sia kantado kaj estas tute al ni malaportuna.

Pluton. Kion ili diras, Menippos?

Menippos. La veron, Pluton, mi malestimas ilin kiel malnoblaj, senindaj subjektoj, kiuj ne kontentaj, ke ili vivis malbone, eĉ nun post la morto pensas pri la supera mondo kaj sopiras je ĝi. Mi ĝojas kiam mi ilin kolerigas.

Pluton. Ne faru tion, ĉar la perdo, kiun ili jeploras ne estas malgranda.

Menippos. Ankaŭ vi Pluton, babilas sence kaj konsentas je ilia bojado?

Pluton. Ne, tute ne, sed mi ne volas ke vi havu malpacon inter vi.

Menippos. Sed sciu, vi plej malbonaj, maltaŭgaj, senindaj el la Lidoj, Frigoj, kaj Asiroj, ke mi tute ne pensas ĉesi. Kien ajn vi iros, mi irados post vi, por fari al vi ĉagrenon per miaj kantoj kaj por ridi je vi.

Krojsos. Ĉu tio ne estas puninda malpiaĵo?

Menippos. Ne; tio estis malpiaĵo, kion vi faradis, kiam vi postuladis ke oni vin ĉiam adoru sur la genuoj, kiam vi senhonte agadis kun homoj liberaj kaj tute ne pensadis pri la morto. Nun ploreĝu, perdinte ĉion.

Krojsos. Multajn, ho Dioj, kaj grandajn proprajojn!

Midas. Mi tiom da oro!

Sardanapalos. Mi tiom da lukso.

Menippos. Bone, bonege, ploreĝu kaj ĝemu tiel senĉese, mi ankoraŭ ofte ekkantos al vi la kanteton: „Ekkonu vin mem!“ Tiu-ĉi kanto tre bone konvenas al via plenda kriado.



Parto dua: Korespondado.

I.

Modeloj de leteroj.

Por komenci leteron.

Via barona, (markiza, grafa) Moŝto! — Via (baronina, markizina, grafina) Moŝto! — Sinjorino grafino! — Sinjoro barono! — Tre estimata sinjoro! — Estimata sinjorino! — Sinjoro! — Kara sinjoro! — Kara amiko!

Por fini leteron.

Mi restas de via sinjora (barona) Moŝto, tre humila kaj obeanta servanto. — Mi restas kun tuta respekto via plej humila servanto. — Mi havas la honoron esti, sinjoro markizo, via k. c. — Via humila kaj obeam. — Ricevu, sinjoro, mian plej koran saluton. — Via humila. — Tute la via. — De l' tuta koro la via. — Kun estimo kaj amika saluto. — Kun alta estimo. — Via amiko. — Via fidela amiko. — Kore vin salutas.

Via plej humila servanto. — Ricevu, sinjoro, la certigon de la plej alta estimo de via obeam servanto. — Kun la plej granda estimo (respekto). — Koran saluton de via —.

Leteretoj amikaj.

Kara amikino!

Estante hodiaŭ vespere invitita al balo, mi bedaŭras senfine ke mi ne povos vidi vin en mia domo. Pardonu kaj faru al mi alian fojon la plezuron de via kara vizito.

* * *

Sinjoro kaj Sinjorino C. havas la honoron inviti Sinjoron kaj Sinjorinon N. al tagmanĝo amika, jaŭdon venontan je l' tria horo. Petas respondon.

* * *

Kara amiko!

Morgaŭ vespere ni estos en la domo kaj vi faros al ni grandan plezuron, se vi venos je l' horo kutima por vespermanĝi kun ni.

* * *

Mi multe bedaŭras, ke ni ne povos akcepti la amindan inviton de vi kaj de via estimata edzino, ĉar forta malsaneto min retenas en mia ĉambro.

* * *

Reveninte en tiu-ĉi momento el la vojaĝo mi tre dezirus paroli kun vi la plej rapide. Se via tempo ĝin permesas, venu tuj al mi; mi vin atendas kun senpacienco.

* * *

Mi multe ĝojas je tio, ke vi fine revenis. Se mi ne havus alian motivon ol saluti vin post tiel longa forestaĉo, tio-ĉi jam estus ŝufiĉa, por rapidi vin viziti. Vi povas tial certe min atendi post tagmezo je l' sesa horo.

* * *

Kion vi pensas, se hodiaŭ ni irus en la teatron? Skribu kelkajn vortojn de respondo kaj sendu ilin per la alportanto de tio-ĉi; mi zorgos pri la biletoj kaj vi venos min kunpreni.

* * *

Ne eble! estas malhelpoj. Morgaŭ buŝe pli multe.

* * *

Ĉar hodiaŭ ni havas tre belan veteron, mi vin atendas post tagmezo je l' horo ordinara. Ni faros promenon al la domo de l' arbaristo kaj trinkos tie la kafon.

* * *

Mian plej koran gratulon por via tago de naskiĝo.

* * *

Multan feliĉon por la nova jaro.

* * *

Mi invitas min hodiaŭ por tagmanĝi ĉe vi.

* * *

Ĉu vi volas tagmanĝi hodiaŭ ĉe ni senceremonie?

* * *

Pet. resp. (Peto je respondo). R. p. (Respondo pagita).

II.

Modeloj de leteroj de ŝanĝo (kambioj).

London, 1^a Januaro 18 . .

Post vido, pagu tiun-ĉi unuan leteron de ŝanĝo al sinjoro A., la sumon de 236 fr. (ducent tridek ses frankoj), valuton ricevitan, kaj metu ilin en mian konton laŭ avizo (sciigo).

Al sinjoro P . . . komercisto en Parizo.

Berlin, 7^a Marto 18 . .

Monaton post hodiaŭ vi pagos por tiu-ĉi unua letero de ŝanĝo laŭ la ordono de sinjoro L. la sumon de ducent frankoj sesdek centimoj, valuton ricevitan, kaj metu ĝin en konton laŭ avizo.

Al sinjoro E. komercisto en Nantes.

London, 6^a Februaro 18 . .

Sinjoro!

Mi tratis hodiaŭ sur vin la sumon de kvarcent kvindek frankoj, pagotajn post vido al sinjoro L. aŭ laŭ lia ordono kaj mi vin petas pagi tiun-ĉi traton kaj meti en mian konton.

Kun estimo

N. N.

Al sinjoro R., bankiero en Parizo.

Asigno.

Bona por 6000 frankoj.

London, 15. Decembro 18 . .

La 20^{an} Januaron de l' jaro venonta vi pagos al sinjoro Moore, aŭ laŭ lia ordono la sumon de sesmil frankoj, valuton ricevitan kaj metu ĝin en mian konton.

N. N.

Al sinjoro F . . . , komercisto en Cherbourg.

III.

Biletoj kaj kvitancoj de ricevo.

Bona por 220 markoj mono de Germanujo.

Post ses monatoj de dato hodiaŭa mi promesas pagi al Sinjoro A. aŭ laŭ lia ordono la sumon de ducent dudek markoj mono de Germanujo, valoron ricevitan per komercaĵoj.

Berlino, 8 Januaro 18 . .

Obligo.

London, 12. Februaro 18 . .

Mi promesas pagi al Sinjoro Evans, aŭ laŭ lia ordono la sumon de libroj sterlingoj, valoron ricevitan.

T. B.

Certigo de ricevo (kvitanco).

Ni certigas per tio-ĉi, ke ni ricevis de sinjoro S. en Berlin la sumon de 1000 markoj mono de Germanujo, kiun ni pruntis al li laŭ lia obligo de l' 4 Januaro de tiu-ĉi jaro.

Monakio, 10 Majo 18 . .

Fratoj Müller.

Alia kvitanco de ricevo.

Mi certigas per tio-ĉi, ke mi ricevis de sinjoro H. la sumon de dudek frankoj kiel procentoj por du jaroj ĝis 1^a Februaro de l' jaro kuranta, de la sumo de ducent frankoj, kiun li ŝuldas al mi.

Rouen, 30 Aprilo 188 .

N. N.

IV.

Modeloj de leteroj komercaj.

Unua letero.

(Por komenci la korespondadon de komerco.)

Al Sinjoro . . . en . . .

Berlin,

Vian estimatan adreson ni dankas al niaj komunaj amikoj sinjoroj . . . kaj per tio-ĉi ni permesas al ni proponi al vi niajn servojn por la vendado kaj aĉetado de sur tiea-ĉi loko.

Ni multe ĝojos se la nuna letero estos la komenco por korespondado, kiu povas esti utila tiel al vi kiel al ni, kaj ni vin certigas ke en ĉiu okazo ni penos fari ĉion eblan por la interesoj de niaj estimataj klientoj.

Donante la referencojn sube skribitajn, ni estas pretaj laŭ via deziro sendi al vi niajn kondiĉojn la plej malaltajn kaj ni atendas vian afablan respondon

Kun alta estimo

N. N.

Referencoj:

Sinjoroj . . .

” . . .

Respondo.

Berlin,

Al Sinjoro . . . en . . .

Respondante vian estimatan de . . . , ni dankas vin por via propono kaj ĉe l' okazo ni plezure akceptos viajn servojn.

Ni petas vin antaŭ ĉio, ke vi sendu al ni viajn plej malaltajn kondiĉojn, por ke en la okazo de bezono ni povu kalkuli ekzakte la koston de viaj artikoloj.

Kvankam dum la nuna stagnacio de komerco ni ne povas fari al vi tuj la esperon de grandaj operacioj, ni tamen kalkulas ke almenaŭ en la estonteco nia kunligo estos kontentiga por la ambaŭ flankoj.

Ni atendas vian respondon kaj restas

Kun la tuta estimo

N. N.

Dua letero.

Hamburg

Sinjoro . . . en London.

Laŭ ordono kaj je kalkulo de Sinjoroj . . . ni hodiaŭ forsendis per la vaporŝipo . . . , kapitano . . . , Londonon sub via adreso, 20 balojn da papero (po 5000 folioj en balo) kaj 8 kestojn da galanteria komercaĵo laŭ specifikacio aldonita, en tuta valoro de Vi volu tuj plenumi la asekuradon de l' senditaĵo en la tuta voloro, kiel eble la plej profite je la kalkulo de niaj amikoj, kaj post la alveno prenu ilian ordonon.

Tiom por hodiaŭ.

Kun la plej granda estimo

.

Respondo.

London

Sinjoroj . . . , Hamburgo.

Kune kun via estimata letero . . . ni ricevis la specifikacion pri dudek baloj da papero kaj ok kestoj da galanteria komercaĵo, kiujn vi elsendis per vaporŝipo . . . Kapitano . . . je kalkulo de Sinjoroj . . . sub nia adreso, kaj ni plenumis la asekuradon je la kalkulo de la diritaj sinjoroj. Sciigon pri ĝi ni rekte al ili sendis.

Ĉiam pretaj por servi al vi, ni restas

kun respekto kaj estimo

.

Tria letero.

Berlin,

Sinjoroj en

Mi ricevis vian leteron de . . . kun la specifikacio kaj la fakturo por la sumo de . . . markoj de Germanujo, kaj kvankam la komercaĵoj kalkulitaj ankoraŭ ne alvenis en mian posedon, mi sendas al vi per ĉi, por saldi la konton, asignon de . . . markoj germanaj pagotan tri tagojn post vido en la Banko . . . de via urbo kaj mi vin petas sendi al mi la certigon de ricevo.

Sendu al mi, mi petas, tuj kaj per vagonaro rapida tridek pecojn da tolo de la sama kvalito kiel la lasta. Tuj post la ricevo mi sendos al vi la leteron de ŝanĝo.

Rekomendante al vi la plej rapidan plenumon de tiu-ĉi komisio mi vin salutas kaj restas

Via humila

.....

Respondo.

....., ^a,

Sinjoro , Berlin.

La monon transsenditan al mi en via estimata de . . . , per letero de ŝanĝo je markoj pagotaj de nia banko . . . mi enportis en vian konton krediton kaj kun danko saldis vian konton.

Via komisio donata al mi samtempe estos morgaŭ ekspedita, kaj mi esperas ke vi estos kontenta tiel je l' elekto kiel je l' kvalito de la komercaĵo al vi sendita.

Mi vin petas, ke vi honoru min daŭrige per viaj estimataj ordonoj kaj esperante ilin mi havas la plezuron resti via

plej humila

.....

Kvara letero.

Lignica,

Sinjoro en Berlin.

Per poŝto returnanta volu sendi al mi vian plej novan precaron.

Mi baldaŭ bezonas viajn artikolojn, kaj se la precoj estos al mi konvenaj, mi sendos al vi mian mendon. Vin salutas

.....

Respondo.

Berlin,

Sinjoro en Lignica.

Ni havas la honoron sendi al vi per ĉi nian plej novan precaron kiun ni rekomendas speciale al via afabla atento. Ni esperas ke la precoj la plej malalte notataj vin igos doni al ni viajn

mendojn ankoraŭ por tiu-ĉi sezono. Estu certaj, ke ni ilin plenumos la plej akurate. Kun respekto

Kvina letero.

Berlin,

Sinjoro en

Perdoj ne esperitaj kaj pli grandaj pagadoj min devigas vin peti ke vi sendu al mi la malgrandan saldon, kiun mi havas ankoraŭ ĉe vi. Rapidan alsendon mi dankos al vi senfine. Pardonu min, ĉar neordinaraj cirkonstancoj estas sole la motivo de mia postulo.

En espero ke vi plenumos mian peton mi subskribas
kun alta estimo

Respondo.

Sinjoro, Berlin.

Respondante vian estimatan de . . . kaj por saldi mian konton ĉe vi mi sendas al vi en aparta koverto markojn mono de Germanujo kaj retenas kiel kvitancon de ricevo la kvitancon de poŝto.

Mi vin kore salutas kaj retas

Via

Modelo de aliĝo al la „Ligo Internacia de Esperantistoj“.

Al sinjoro

reprezentanto de l' Klubo Esperantista
en

Mi deziras laŭ la „Regularo de la Ligo Internacia de Esperantistoj“ fariĝi membro (oferanto) de tiu-ĉi ligo kaj sendas al vi markojn pfenigojn (. . . rublojn kopekojn) kiel enporton por monatoj.

Mi penos trovi du personojn kiuj sendos al vi tian saman leteron.

Kun alta estimo

Adreso:

(Subskribo)



Tabelo de mono.

Landoj	Mona unuo	Markoj	fenigoj	guldenoj aŭst.	krejceroj	frankoj	centimoj
Germanujo	1 Marko de Germanujo . . . po 100 fenigoj	1	—	50	1	25	
Aŭstrujo-Hungarujo	1 guldeno po 100 krejceroj	2	—	1	—	2	50
Belgujo, Svisujo Francujo, Luksemburgujo	1 franko po 100 centimoj	—	80	—	40	1	—
Italujo	1 liro = 1 franko po 100 centezimoj	—	80	—	40	1	—
Danujo, Svedujo	1 krono po 100 oeroj	1	15	—	57	1	44
Grekujo	1 drakmo po 100 leptoj	—	72	—	36	—	90
Granda Britanujo	1 Livro Sterlingo po 20 ŝilingoj po 12 penceoj	20	—	10	—	25	—
Holandujo	1 floreno po 100 centoj	1	70	—	85	2	12 ¹ / ₂
Norda Ameriko	1 dolaro po 100 centoj	4	—	2	—	5	—
Norvegujo	1 talero species po 4 kronoj po 30 ŝilingoj	4	50	2	25	5	62 ¹ / ₂
Portugalujo	1 milreiso po 1000 reisoj	4	66	2	33	5	83
Rusujo	1 rublo po 100 kopekoj	3	26	1	63	4	7
Hispanujo	1 peseta = 1 franko po 100 centoj	—	80	—	40	1	—
	1 duro = 1 dolaro po 20 realoj	4	—	2	—	5	—
Turkujo	1 piastro po 40 paroj	—	18	—	9	—	22 ¹ / ₂

livro - sterlingoj	ŝilingoj	pencoj	rubloj	kopekoj	dolaroj	centoj	kronoj	oeroj	drakmoj	leptoj	floren. holand.	centoj	taleroj species	kronoj	ŝilingoj	milreisoj	reisoj	duroj	realoj	piastroj	paroj
—	1	—	—	31	—	25	—	87	1	39	—	59	—	—	26	—	215	—	5	5	22
—	2	—	—	62	—	50	1	74	2	78	1	118	—	1	23	—	430	—	10	11	4
—	—	9 ^{1/2}	—	24 ^{3/4}	—	20	—	69 ^{1/2}	1	11	—	47 ^{1/5}	—	—	21	—	172	—	4	4	18
—	—	9 ^{1/2}	—	24 ^{3/4}	—	20	—	69 ^{1/2}	1	11	—	47 ^{1/5}	—	—	21	—	172	—	4	4	18
—	1	1 ^{3/4}	—	35 ^{1/2}	—	28 ^{3/4}	1	—	1	60	—	68	—	1	—	—	247	—	5 ^{3/4}	6	14
—	—	8 ^{1/2}	—	22	—	18	—	62	1	—	—	42 ^{1/2}	—	—	19	—	155	—	3 ^{3/5}	4	—
1	—	—	6	20	5	—	17	40	27	80	11	80	4	1	22	4	300	5	—	111	—
—	1	8 ^{1/4}	—	52	—	42 ^{1/2}	1	47	2	38	1	—	—	1	15	—	360	—	8 ^{1/2}	9	18
—	4	—	1	23	1	—	3	48	5	56	2	36	—	3	16	—	860	1	—	22	8
—	4	6	1	38	1	12 ^{1/2}	3	90	6	35	2	65	1	—	—	—	965	1	2 ^{1/2}	25	—
—	4	8	1	44	1	16	4	5	6	60	2	75	1	—	5	1	—	1	3	26	—
—	3	3	1	—	—	81 ^{1/2}	2	84	4	53	1	92	—	2	24	—	700	—	16 ^{1/8}	18	4
—	—	9 ^{1/2}	—	24 ^{3/4}	—	20	—	69 ^{1/2}	1	11	—	47 ^{1/5}	—	—	21	—	172	—	4	4	18
—	4	—	1	23	1	—	3	48	5	56	2	36	—	3	16	—	860	1	—	22	8
—	—	2 ^{1/5}	—	5 ^{3/8}	—	4 ^{1/2}	—	15 ^{1/2}	—	15	—	10 ^{1/2}	—	—	4 ^{3/4}	—	39	—	9 ^{1/10}	1	—

Nomaro

de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto,
kiuj eliris ĝis Junio 1890.

Nro.	Nomo de l' verko:	Kosto:
1.	D-ro Esperanto. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono rusa)	15 kopekoj
2.	— (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono pola)	15 "
3.	— Langue Internationale. Préface et Manuel Complet (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono franca)	20 "
4.	— Internationale Sprache. Vorrede und Vollständiges Lehrbuch (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono germana)	20 "
5.	R. Geoghegan. Dr. Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono angla)	20 "
6.	D-ro Esperanto. Malgranda vortaro de la lingvo Esperanto (kun antaŭparolo) por Rusoj	3 "
7.	— por Poloj	3 "
8.	— por Francoj	3 "
9.	— por Germanoj	3 "
10.	— por Angloj	3 "
11.	— Dua Libro de l' Lingvo Internacia (verkita en la lingvo Esperanto)	25 "
12.	— Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia (en Esperanto)	10 "
13.	Hanez. Safah achath lekulanu (Lerno libro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea)	20 "
14.	A. Grabowski. La Neĝa Blovado. Rakonte de Puŝkin (en Esperanto)	15 "
15.	L. Einstein. La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltspracheproblems. Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniss nach dem Entwurf des pseudonymen Dr. Esperanto	50 "
16.	N. N. Rusa traduko de la »Dua Libro de l' Lingvo Internacia	25 "
17.	D-ro Esperanto. Plena vortaro rusa-internacia	1 rublo
18.	N. N. Rusa traduka de la »Aldono al la Dua libro«	10 kopekoj
19.	A. Grabowski. La Gefratoj. Komedio de Göthe (en Esperanto)	15 "
20.	L. Einstein. Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen Volapük und Lingvo Internacia	25 "
21.	D-ro Esperanto. Meza vortaro internacia-germana	25 "
22.	Henry Phillips, Jr. An Attempt towards an International Language by Henry Phillips Jr., a secretary of the American Philosophical Society. Together with an english-international vocabulary compiled by the translator	50 "
23.	Hanez. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana	20 "


Nro.	Nomo de l' verko:	Kosto:
24.	G. Henriclundquist. Dr. Esperantos' Internationelt Sprak (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono sveda)	20 kopekoj
25.	A. Demonget. Internacia ou Volapük? par Léopold Einstein, traduction de Auguste Demonget	25 "
26.	E. de Wahl. Vortaro Esperanto-hispana	3 "
27.	G. Henriclundquist. Vortaro Esperanto-sveda	3 "
28.	Klubo Nürnberga. La Lingvo Internacia, Vollständiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörterbuch zum Gebrauche für Deutsche. Herausgegeben vom Nürnberger Weltsprache-Verein	25 "
29.	R. Libek. Starptautiska Valoda (Lernolibro de la lingvo Esperanto. (Eldono latva) (Lettisch)	60 "
30.	Kolekto da novaj verkoj (en Esperanto), kajero N-o 1	25 "
31.	Adresaro de la Esperantistoj, kajero N-o 1	10 "
32.	Marietta Frollo. Vortareto Esperanto-rumana	3 "
33.	Chr. Nielsen. Laerebog til det internationale Esperantosprog. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono dana)	25 "
34.	M. S. Bogdanov. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bulgara)	50 "
35.	Dr. D. Marignoni. Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono itala	25 "
36.	J. Rodriguez Huertas. Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hispana)	20 "

Ciuj supre skribitaj verkoj povas esti ricevataj en multaj librejoj; se Vi ne ricevovs ilin en librejo, Vi povas sendi la necesan monon rekte al »L. Zamenhof, Varsovio«, kaj li elsendos al Vi la deziritajn verkojn rekte per la poŝto. Por la poŝta transsendo oni devas aldoni po 20% de la kosto de l' verkoj. Kiu aĉetas ne malpli ol por unu rublo, tiu por la transsendo ne pagas.

Kiu volas ĉiam scii pri la progresado de la lingvo Esperanto, al tiu ni rekomendas la gazeton „La Esperantisto“. Gi eliras (en la lingvo Esperanto) unu fojon en la monato kaj kostas (kun transsendo) 58 kopekoj por la 1/4 jaro. Redaktoro: Chr. Schmidt en Nürnberg, Spittlerthorgraben 33. Oni povas aboni sur la poŝto kaj en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nürnberg. Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto de ĉia lando.



Tabelo de enhavo.



Parto unua: Interparolado.

I. Frazoj la plej ofte uzataj.

Por demandi, respondi	paĝ.	5
Por proponi	"	5
Por peti	"	5
Por konsenti	"	6
Por malkonti, praviĝi	"	6
Por fari kaj ricevi dankojn	"	6
Por konsili, pripensi, decidi	"	6
Por certigi	"	7
Por nei	"	7

II. Interparoloj.

Vizito	"	7
La vetero	"	9
La leviĝado el la lito	"	11
La kuŝiĝado	"	12
La matenmanĝo	"	13
La tagmanĝo	"	14
Restoracio	"	16
En kafejo	"	17
Sur la fervojo	"	18
Sur la maro	"	20

III. Dialogoj el komedio de Goldoni: »l' Amore paterno (La Amo patra).«

Dialogo unua	paĝ.	23
Dialogo dua	"	24
Dialogo tria	"	25
Dialogo kvara	"	26


IV. Dialogoj el Lukianos.


Hefajstos kaj Apollon	”	28
Zeus, Asklepios kaj Herakles	”	29
Hermes kaj Haron	”	30
Pluton aŭ kontraŭ Menippos	”	31

Parto dua: Korespondado.

I. Modeloj de leteroj.

Por komenci leteron	paĝ.	33
Por fini leteron	”	33
Leteretoj amikaj	”	33
II. Modeloj de leteroj de ŝanĝo (kambioj)	”	35
III. Biletoj kaj kvitancoj de ricevo	”	36
IV. Modeloj de leteroj komercaj	”	37
Tabelo de mono	”	42
Nomaro de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto	”	44





W. Tümmel's Buchdruckerei, Nürnberg.

